

ESPERANTISTA

REVUO POR ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Eldonas Esperanto-Asocio en ĈSR, Praha II, Malá Štěpánská 7. – Redaktas Dr. Stan. Kamarýt

Boj za mír a esperantisté

Francouzský poslanec Lucien Cornet a 67 druhů podalo 3. dubna 1906 ve francouzském parlamentě návrh resoluce, jenž zněl: »Počínaje školním rokem 1907/8 budiž studium mezinárodního jazyka esperanto zařazeno do učebních osnov všech veřejných škol, na nichž se vyučuje živým jazykům. Toto vyučování bude nepovinné a studující budou si moci vybrati mezi angličtinou, němčinou, italštinou, španělštinou, arabštinou a esperantem.« Návrh byl předán podle jednacího řádu komisi pro školství a krásná umění. Iniciátorem resoluce byl Dr. Emil Javal, slavný francouzský okulista, nadšený a obětavý esperantista, který si přál, aby Zamenhof odstranil diakritická znaménka písmen. Bylo to v době, kdy kvetl buržoasní kapitalismus. Pokrok společnosti byl závislý na iniciativě jednotlivců a přecho to na hmotné podpoře buržoasních mecenášů. Resoluce Coretova zůstala v komisi. Ale přes to začalo se učit esperantu oficiálně na řadě veřejných škol ve Francii a po jejím příkladu v jiných zemích. Mezi francouzskými esperantisty byla řada vlivných mužů. Dovedli přesvědčovati rozhodující místa a zdálo se, že roku 1914 u příležitosti desátého světového kongresu, k němuž se přihlásilo 3739 účastníků z 50 zemí, budou vyhlášeny významné zákonodárné akty pro esperanto.

Prvá světová válka udělala konec těmto nadějím. Po válce byla situace zcela jiná. Účinek říjnové revoluce, soumrak buržoasie a jejích ctností, imperialistické stadium kapitalismu, Společnost národů. Esperantisté se zařídili v této situaci. Bylo třeba prohloubit organizaci hnutí, jež muselo žít z vlastních prostředků, bez mecenášů.

Veřejnoprávní akty pro esperanto bylo třeba vymáhati od organizovaných politických stran. Společnost národů ukázala se hned na počátku své existence bázlivá a opatrná i v otázce esperanta. Když na druhé schůzi Společnosti r. 1921 byla podána resoluce 13 zástupců vlád, navrhuující studium otázky pomocného mezinárodního jazyka a následujícího roku byl přijat referát jednoho ze tří zástupců generálního sekretáře Dra Nitobe o vyučování esperantu na školách členských států, byla věc skoncována postoupením komisi pro intelektuální spolupráci. Ta se usnesla doporučit místo esperanta studium živých světových jazyků.

Esperantisté ovšem nesložili ruce v klín. Poučení kritikami idistickými, věnovali více péče esperantu jako jazyku a méně propagandě. Pro rozšíření esperanta zdálo se pak jako nejschůdnější cesta navrhnutí mezinárodní konvenci, v níž by se některé státy zavázaly, že zavedou pokusně povinné vyučování esperantu na stanoveném počtu škol, bude-li tuto konvenci ratifikovati aspoň 6 států. Text této smlouvy vypracoval na podnět Dra Št. Czubryňského z Varšavy Dr. Edmond Privat ze Ženevy. Náš svaz vyvinul

okolo r. 1930 značné úsilí, aby pro myšlenku získal tehdejší ministerstva školství a zahraničí, ale bez úspěchu. Stejný neúspěch měli esperantisté v Rakousku, Maďarsku, Polsku a j. Přes to vytrvalé jednání esperantistů dosáhlo v různých zemích krátce před vypuknutím druhé války řadu veřejnoprávních opatření esperantu příznivých. Velmi kladně působil i rozkvět esperanta mezi dělníky, kteří se organizovali samostatně jednak v Sennacieca Asocio Tutmonda, která však byla z většiny kosmopolitická a v Internacio de Proleta Esperantistaro, jež byla na ideově základně dialektického materialismu. Esperantisté, poučení neúspěchy u Společnosti národů i s mezistátní konvencí o vyučování esperantu, (Interstata Akordo) pokoušeli se na konci období mezi dvěma válkami o akci masovou. V přípravách k tomu vypukla druhá válka. Po druhé válce zničila poctivou organizaci práci mnoha let.

Mezi počtem těch, kdo absolvovali kursy esperanta anebo se esperantu učili z učebnic a mezi počtem aktivních esperantistů je velký nepoměr. Příčina tohoto je asi v tom, že hnutí nemůže nabídnouti novým stoupencům dosti aktivní činnosti vyjma práci na esperantu a pro esperanto. Esperantisté vždy se domnívali, že nabízejí jeden z nástrojů pro zachování míru. Nabízejíce esperanto jako ne jediný jazyk lidstva nýbrž jako druhý všem společný jazyk vedle jazyka mateřského, podivuhodně předjali učení Stalinovo o tom, že kulturní úkol menších národů není ještě splněn, že právě malé národy čeká velký rozvoj jejich kultury jako svéprávné členy v rodině národů. Nikdy však nebyl boj o mír organizován ve velkém měřítku. To je právě významný rys současnosti. Lid sám se rozhodl bojovati za mír, nejprve lid Sovětského svazu a lidových demokracií, ale pak i lid ze států kapitalistických. Jak by mohli esperantisté státi stranou tohoto boje! Esperantisté, kteří zpívají »Sub la sankta signo de Espero kolektiĝas pacaj batantoj«, sami se řadí do boje za mír vědouce, že mír nebude vyprošen ani darován, ale vybojován. To je smysl usnesení mírových kongresů v Stockholmu a ve Varšavě a Světové rady míru v Berlíně. Esperanto se nemůže šířit, není-li zaručen mír. To je zkušenost esperantistů ze dvou válek. Je povinností nás, československých esperantistů, poučovati vytrvale zvláště esperantisty v kapitalistických státech, co znamená organizovaný boj za mír na podkladě proletářského internacionalismu a jaký význam má pro boj za mír stockholmská resoluce z března 1949.

V tom je novost dnešní situace. Nabízíme esperantistům velmi konkrétní používání esperanta: bojujte aktivně za mír tím, že budete vždy znovu a znovu vykládati esperantistům v západních zemích, co znamená československý boj za mír.

S. K.

Raporto pri agado de EAĈSR en 1950 (Prezentota al regula Asocio iarkunveno en Praha en majo 1951.)

En Brno-kongreso laŭ decido de nia Asocio kaj de Slovaka Esperanto-Societo fariĝis SES aŭtonoma sekcio de la Asocio. Ĝi gvidas memstare laboron en Slovakujo, ĝia statuto fariĝis ĝia Regularo. Raportante pri nia agado dum la pasinta jaro ni raportas en kelkaj alineoj pri la tuta lando, en aliaj sole pri ĉefaj landoj.

1. **Konsisto de la komitato.** La Centra komitato elirinta el balotado en la kongreso kaj el anoj delegitaj de SES kaj de lokaj grupoj en Praha, Brno, Hradec Králové kunlaboris kontingente kaj restis sen ŝanĝo dum la jaro.

2. **Komitataj kunvenoj** okazadis regule lastan mardon de ĉiu monato escepte julion, aŭguston kaj novembron, prezidatis ilin Ad. Malík, Rudolf Hromada, Jar. Mařík. Protokolis Mařík 6, Mičová 2, Hromada 1.

3. **Regionaj kunvenoj** okazis en Karviná (26. III.), Bohumín (23. IV.), Háj (21. V.), Tanvald (26. V.), Trnava (26. VI.), Rožnov (23. VII.), Veselí n. M. (20. VIII.), Kopřivnice (24. IX.), Vrútky (8. X.), Litvínov (24. IX.), Ostrava (29. X.), Butovice (26. XI.), Olomouc (9. I. 1951), Kyjovice ve Sl. (11. III. 1951). Ĉe multaj ĉeestis reprezentanto de la Centra Komitato.

4. **Administrado.** Ni posedas en Praha II, Malá Štěpánská 7 duĉambran oficejon, tre bone alireblan de la placo Karlovo náměstí, kie laboras nia oficeja sekretario Tomáš Balda kaj Marie Baldová por decaj salajroj. Krome ni havis helpan libroteniston s-rinon E. Pišvejcová, kiu laboris ĝis aŭgusto 1950. La pluajn monatojn librotenis kaj la jaron 1950 bilancis R. Hromada. La jaron 1951 librotenas s-ino H. Göbelová.

En la oficejo koncentriĝas ĉiuj korespondaĵoj kaj la oficeja sekretario distribuas ilin al koncernaj funkciuloj. Prezidanto Adolf Malík zorgas pri ĝenerala politika linio de niaj laboroj, vicprez. P. Rosa estras laborojn de SES en Bratislava, vicprez. R. Hromada kontrolas membrastaton laŭ regionoj kaj vizitas laŭ ebleco la regionajn kunvenojn. Li faris ankaŭ sennombrajn intervenojn ĉe la oficoj (pri la gazeto, libroj, impostoj k. s. Vicprez. Kamarýt korespondas pri kelkaj difinitaj temoj. Ĝen. sekretario J. Mařík respondas ĝeneralan korespondadon, zorgas pri fondado de la lokaj grupoj, kontaktas kun alilandaj Esperanto-centroj, rilatas kun ĉeĥoslovakaj instancoj. Sekretariino J. Mičová protokolis en du kunvenoj kaj en la kongreso. Ges-oj Balda zorgas pri administrado de membroj, ekspedado de »Esperantista«, »Esperanto-Servo«, libroj kaj aliaj presaĵoj kaj pri tiurilata korespondado.

Protokoloj pri la komitataj kunvenoj estis sendataj al la membroj sole en kelkaj okazoj.

5. **Regionaj perantoj.** Listo laŭ la nuna stato:

I. Praha: Jaroslav Šustr (I, Dlouhá 10).

II. České Budějovice: Ing. Lad. Krajč (Žižkova 42).

III. Plzeň: Josef Reiser (Krajská správa spojů).

IV. Karl. Vary: provizore MUDr. Frant. Vaněk (Nová Role).

V. Ústí n. L.: Václav Růžička (Děčín, Kozinova 103).

VI. Liberec: Teo Novotný (Pražská 3).

VII. Hradec Králové: Frant. Pytloun (Zámenhofova 1010).

VIII. Pardubice: vakas.

IX. Jihlava: J. Poláček (Třebíč, Stalinova 72).

X. Brno: Josef Friedrich (Hoblíkova 8).

XI. Olomouc: Ph. Dr. Bohuslav Záček (Křížkovského 10).

XII. Gottwaldov: Josef Odehnal (Zlín, Mostní 990). De januaro 51 vakas. Anstataŭanto: Jiřina Honsová (G. Zlín, Lazy IV.).

XIII. Ostrava: Vladimír Slaný (VII, Kutuzovova 29).

XIV. Bratislava: vakas.

XV. Nitra: Ing. Ján Kindl (cukrovár).

XVI. Vysoké Tatry: Mikuláš Novák (Svit 352).

XVII. Banská Bystrica: vakas.

XVIII. Košice: A. D. Kremer (Trnča 3).

XIX. Prešov: vakas.

Ni uzas la okazon por tie ĉi publike danki al eksperimento en la IV-a regiono Frant. Patera, kiu laboris en la regiono dum pluraj jaroj ofereme kaj sukcese ĝis septembro 1950, kiam li transiris al nova laborloko en Hořice v P.

6. **Lokaj grupoj** ekzistas en (enkrampe la nombro de iliaj membroj, are anoncitaj kaj pagitaj al la Asocio): Aš (22), Bohumín (19+7), Brno (209+27), Břeclav (39), Česká Lipa (26), České Budějovice (40), Darkov (15), Děčín (35), Doksy (36), Gottwaldov (30), Háj (12), Hradec Králové (225), Cheb (83), Chlumec n. C. (—), Chomutov (18), Chrástava u Liberce (23), Jablonec nad Nisou (24), Jaroměř (—), Jičín (—), Jihlava (12), Karlovy Vary (47), Karviná-2 Doly (18), Kladno (23), Kolín (31), Kopřivnice (31), Lanškroun (8), Liberec (51), Lichnov (12), Litoměřice (10), Litvínov (22), Mar. Lázně (10), Mimoň (16), Mladá Boleslav (5), Modřany (15), Most (24), Nejděk (13), Nový Bor (24), Nymburk (12), Nýřany (14), Olomouc (57), Opava (28), Ostrava I. (26), Ostrava I. Junularo (47), Ostrava II. (Fervojistaj) (21), Ostrava-Komenský (10), Slezská Ostrava (19), Pardubice (21), Plzeň (127), Praha (404), Prostějov (7), Příbor (15), Rokycany (29), Sezimovo Ústí (—), Sokolov (—), Svitavy (11), Tábor (66), Tanvald (16), Teplice (—), Trutnov (23), Třebíč (102), Trinec (27), Turnov (24), Týniště n. O. (—), Uher. Hradiště (27), Úpice (7), Ústí n. L. (40), Vejprty (22), Veselí nad M. (14), Vítkov (—), Vodňany (—), Vsetín (33), Zákupy (—).

Entute pere de la kluboj estas organizitaj en la Asocio 73 procentoj de niaj membroj en la jaro 1950. En la lokoj, kie mankas la membro-nombro kluba, ekzistas tamen izolaj membroj.

Rondetoj en: Aš, Břeclav, Dobruška, Hradec u Op., Jeseň, Jičín, Mariánské Lázně, Most, Otrokovice, Poděbrady, Přerov, Příbor, Strakonice, Svitavy, Vejprty, Veselí n. M.

E-fakoj de Uzinaj kluboj ROH: Brno (Dopravní podniky m. Brna), Jionice (Motorlet, závod J. Švermy), Lučín (Sigma), Ml. Boleslav (AZNP), Nový Bohumín (ČSD), Olomouc (ČSD), Ostrava (ČSD), Plzeň (Škoda), Strakonice (Vlnařské závody, Fezárna), Šluknov (ČSD), Vsetín (Z-klub, Zbrojovka), Záluží (Stalinovy závody), Žandov u Č. L. (Textilstroj).

Jenaj lokoj anoncis intereson fondi lokan grupon: Duchcov, Hlinsko p. H., Hrušovany n. Jeviš, Chřibská ap. N. Bor, Mělník, Skoronice ap. Kyjov.

Sume 94 grupoj, pasintjare 80.

Multaj grupoj vidigas daŭre vigran aktivecon. E. K. en Praha, nia plej grandnombra loka grupo, liveras laborantojn por nia centro, E.K. en Brno aperigas beĥe presitajn kvarmonatajn programojn de siaj semajnaj kunvenoj, grupoj en Hradec Králové, Lanškroun, Olomouc, Cheb, Ostrava, Opava, Plzeň, aperigas por siaj membroj regulajn ciklostilitajn cirkulerojn, programoj de kluboj en Brno, Praha, Hradec Králové ofte estas rimarkindaj ĉu pro temoj ĉu pro prezentmaniero. Kluboj en Praha kaj Ostrava edukis respektindan nombron de junularo. Kluboj en Karlovy Vary kaj en Ostrava estis entreprenantoj de la someraj kursaroj. Kontraŭe: pri agado de kelkaj lokaj grupoj ni malofte ion legas. En Tabelo de enhavo de »Esperantista« 1950 ni enpresis alfabete liston de lokoj, pri kiuj ni dum la jaro povis raportiti. Studu ĝin ĉiuj membroj de niaj lokaj grupoj kaj klopodu, ke ni povu raportiti ankaŭ pri ilia loko.

7. **Publikiga agado.** De nia organo ni eldonis 10 numerojn kun sume 80 paĝoj. Por la jaro 1951 ni ricevis de la Informministerio pli grandan paperkvoton, ni do eldonados numerojn po 12 paĝoj kaj 12 foje dum la jaro.

En septembro sciigis nin presejo en Karlovy Vary, ke ĝi pro reorganizo de sia laborplano ne plu povas presi nian gazeton. Ni estis de la Centro de poligrafia industrio transdonitaj al presejo Orbis 6 en Praha. La redakcia komisiono fieras, ke spite neatenditan ŝanĝon la

septembra numero aperis sen malfruigo. Ni uzas la okazon por danki al s-o Fr. Mílek, tipografo en presejo en Karlovy Vary, pro lia valora helpo dum ni estis presataj en lia presejo.

Instituto de la Esperanto servo eldonas informan bultenon grandformatan redaktatan de Adolf Malík. Dum la jaro aperis 12 numeroj kaj unu speciala eldono kvarpaĝa. Amplekso de »Esperanto-Servo« kreskas de jaro al jaro.

Krom tiuj du organoj ni eldonis prese :

Propagandaj afiŝoj okaze de Brno - kongreso..	7000	ekz.
Tekstoj de kantoj prez. en la kongresa koncerto	1000	»
Raporto pri agado 1949, 2 paĝoj	4200	»
Propozicio de E-stenografio (Ad. Staňura), 4 p. ..	200	»
Veš mezi nehty (Z. Skybal), 1 paĝo	200	»
Ellerni 1—12, (S. K.), 12 paĝoj	500	»
Učebné texty pro kursy (L. Krajčic), 40 p. ciklostilite	1500	»
Nia Asocio ekŝiĝis el UEA (reprezo el 1-a nro de E. 1951)	100	»
Mapo de la Respubliko kun du popolaj kantoj ..	5000	»

La lasta estas eldono de nia Instituto de E. S.

8. Kontakto kun oficialaj aŭtoritatoj. Prezidenta kabineto dankis al ni pro saluttelegramo sendita al s-ro prezidento el la Brno-kongreso per letero el la 5. VI. 1950 n-ro 112 308/50. — Kongreso en Brno okazis kun honora patroneco de Regiona Nacia Komitato en Brno. Diskurso de s-ro L. Gregor el la Informministerio komisiite de la ĉefo de la I-a departemento s-ro Petr Konečný laŭ volo de s-ro ministro Václav Kopecký signifas pluan agnoskon de nia agado fare de la ministerio. Same alparolo de JUC. Imro Havaš el la respektiva Komisiitejo el Bratislava. Dum la kongreso en Brno stampis la poŝta oficejo en la kongresejo per speciala nuligilo. — La ministerio de instruado, sciencoj kaj artoj informis nin per letero el la 14. IV. 1950 n-ro 28 761/50-S/5, ke ĝi notis kun kontento nian informon pri la du esperantlingvaj eldonoj de la publikaĵo »Lerneja Reformo en Ĉeĥoslovakio«. — Kun la Ĉs. Komitato de pacdefendantoj ni kontaktis rilate al ĉeĥoslovaka partopreno en la Pariza Universala Kongreso. — Nia kontakto kun la Ĉs. fervojoj n. e. en afero de veturrabato al la Brno-kongreso rezultigis 33 % redukton de la veturprezo. — Por la partoprenantoj de la someraj kursaroj de E. ĝi konsentis 50 % rabaton de veturprezoj. — Distrikta Nacia Komitato en Kladno eldonis laŭ instigo de nia membrino verkon de Marie Majerová »Urbo sub signo de fajro« en E-traduko de B. Vlčková.

9. Kontakto kun nia centra organizo. Ni estis asocio aliĝinta al UEA. En ĝia komitato reprezentis nin J. Mařík, Fr. Pytloun, E. V. Tvarožek (por SES), J. Vondroušek. — Kun la prezidanto de UEA ni korespondis pri nia partopreno ĉe Pariza kongreso. — Ni faris enketon pri propaganda laboro en nia lando laŭ iniciato de UEA-propaganda fako kaj informis ĝin pri rezultato. — Ni kontaktis kun la I. E-Muzeo en Wien pri Esperantista Panteono. — Por Pariza UK nek por SAT-kongreso en Torino ne estis donitaj elirvizoj.

Ĉar ni ne povis konsenti kun neŭtraleco de UEA-gvidantaro al aktiva pacbatalo sur bazo de la Stokholma rezolucio, ni ekŝiĝis laŭ decido de kunveno la 30-an de decem. 1950 la 31-an de decembro el UEA kaj decidis iniciati fondon de Internacia Ligo de Progresemaj Esperantistoj, kies ĉefa celo estas aktive batali por la paco sur bazo de proleta internaciismo. Ni petos ĉe koncernaj instancoj por ricevi permeson pagi al UEA katizojn de Asociaj membroj pro 1949 kaj 1950.

10. Kontakto kun ceteraj landaj asocioj. Ni sendis nian raporton pri agado 1949 al ĉiuj naciaj asocioj. Kun ĝojoj ni legis konfirmon pri lego en letero de Asocio de Pollandoj E. kaj afablan mencion en British Esperantist. En tiu ĉi organo ni ĉiam atente legas anglalingvan raporton pri agado de la Brita Asocio kaj aliajn organizajn raportojn, precipe ekzemple ĝiajn anglalingvajn lokajn informojn.

Legu de tiaj sciigoj tre utilas al priorganiza laboranto, instigante al imito kaj al kritiko. Sed ŝajnas, ke ne multaj legas tion. En nia organo estas longaj listoj de lokaj informoj. Ili estas nepre konvinka atesto pri tre vigla organiza vivo. Ni iom miras, ke escepte Svisan Esperon ni ĝis nun neniam legis en aliaj esperantistaj gazetoj iun ajn mencion pri tiu ĉi fakto certe rimarkinda. — Al Itala Esperanto-Federacio ni donis detalan informon pri porinfanaj literaturo kaj bibliotekoj en nia lando. Ĝi transdonis niajn sciigojn al »Centro Studi di Letteratura Infantile« en Torino, kiu danke konfirmis al ni ricevon de tiuj dokumentoj per letero el 6. XI. 1950. — Kun Pollando ni korespondis pri Interŝtata Esperanto-Akordo. — Kun Francujo (Dronchat) ni korespondis pri propono sendadi amase leterojn al ministroj kaj ne rekomendis tiun iniciaton. — Al Sudvietnama Esperanto-Asocio ni donis informojn pri la movado nialanda kaj informan materialon pri nia lando. — La Asocion de Esperantistoj en Pollando ni informis pri esperantistaj delegitoj veturantaj al la Varsovia pacokongreso. — La fondantan kongreson de la Ĉina Esperantista Ligo (7. II. 1951) ni salutis telegrame kaj alsendis pakaĵon de esperantlingva informa materialo. — Nov-Zelanda E-Asocio liveris al ni filmon pri sia lando, kiu estis ĉe ni projekciata en multaj kluboj. — Ni reciprokis saluton de la III-a Sudhungarlanda Esperanto-Konferenco en Hödmözövasárhely (julio). — Paŭlon Nylén, maljunan pioniron svedan, amikon de nia nacio, ni salutis perletere okaze de lia 80-a naskiĝtago.

11. Propagando ĝenerala. En Lokaj informoj ni enskribis raportojn en 70 lokoj. En pasinta jaro estis 85. — La publikaj kursoj komenculaj okazis 78 en 49 lokoj por 1651 partoprenantoj. En j. 1949 estis respektivaj nombroj 71, 48, 1706. Do preskaŭ sen ŝanĝo. Preskaŭ ĉiuj kursoj estis aranĝitaj de klerigaj kunularoj (Osvětové besedy), ie estis kursoj aranĝitaj sub patroneco de Kulturkluboj entreprenaj. Kursojn por progresantoj oni povas malfacile kalkuli por statistikaj celoj, lam aranĝis ilin kluboj kiel parton de kluba kunveno aŭ antaŭ la kunveno, ĉe iaj ne estas facile fiksi komencojn kaj finojn de la kursoj kaj simile. Regule okazigas progresantajn kursojn por siaj membroj kluboj en Praha, Brno, Hradec Králové. — Nian propagandan ĉeflingvan informan folion »Lingva ligilo« ni uzas aldonante ĝin ekz. al kajeroj de nia organo prezentataj kiel dokumento al diversaj instancoj. Sed de nia membraro estas tiu ĉi folio uzata en amplekso tre nesufiĉa. Dissendo de tiu ĉi presaĵo al gravaj adresoj en la urbo estas tre efika. Ni tre rekomendas tiun ĉi metodon de propagando. — Ni atentigas ankaŭ pri niaj diapozitivaj, kiujn ni senpage disponigas al niaj grupoj. — La kongreso en Brno estis per si mem grava faro propaganda. Precipe menciinda estas granda resonado, kiun ĝi havis en gazetaro de Brno. — Milo da kongresanoj en Brno, 440 kursanoj en someraj kursaroj, kelkcent partoprenantoj de 13 regionaj kunvenoj estas pro si mem ankaŭ grava faktoro propaganda, pli ol du mil esperantistoj vojaĝis ja en 1950 por eksterklubaj entreprenoj. Fakto elokvente pruvanta vivantecon de la movado en nia lando. — Ankaŭ titoloj kaj adresoj de nia Asocio kaj de nia Instituto en la telefonlibro estas propaganda fakto menciinda. — En Plzeň establis la regiona estraro kun financa helpo de la Centra Komitato duĉambran regionan sekretariejon kun ĉiutaga deŝoro. Same propagande efikas triĉambraklubejo de nia Junularo en Praha XII kaj de la grupo en Děčín. — Nia loka grupo en Úpice instigis per presita flugfolio »Úpice-kampanjo por perradia kurso de Esperanto« kiu sekvigis multajn petskribojn al la Ĉs. Radio. — Filmo el Brno-kongreso estas pruntata al niaj kluboj. — Propagandaj afiŝoj (7000) pri Esperanto okaze de nia 8-a kongreso estis afiŝitaj dum 14 tagoj en 256 urboj kaj urbetoj de Bohemio kaj Moravio.

Fine de la j. 1950 ni laŭ peto de UEA-Propaganda Fako enketis la lokajn grupojn kaj rondetojn pri ilia aŭtuna

propaganda agado inter la datoj 1. VIII. kaj 15. XI. 1950. Nian demandaron respondis 40 grupoj kaj rondetoj inkluzive Slovakion do 50 % el 80 demanditaj. La ciferoj pri la agado dum tri kaj duona monatoj estas interesaj. En tiu tempo aperis proksimume 62 artikoloj pri E. en 40 gazetoj, okazis 28 disaŭdigoj en la nacia lingvo pri E. (plejparte per urbaj laŭparoliloj). Oni krome aranĝis 43 prelegojn, kiujn aŭskultis 4548 homoj. La grupoj disdonis (aŭ instigis publikan instancon fari tion) 29 797 flugfoliojn (el tio 25100 en Praha). 3500 afiŝoj informis pri Esp. kaj kursoj. 93 aliajn rimedojn de propagando oni utiligis (varbkestoj kaj montrofenestroj, kinoreklamoj, ekspozicioj, laborbrigadoj de esperantistoj, starigo de E-memorŝtono k. t. p.). En tiu tempo oni gvidis 35 elementajn kursojn kun 830 partoprenantoj kaj 17 superajn kursojn por 287 lernantoj.

12. Propagando en fakaj rondoj. Kun Revolucia Sindikata Mavado (ROH) ni traktas pri ebleco, ke ni dum reorganizo de kulturaj institucioj ĉeĥoslovakaj estu akceptitaj kiel sekcio de ĝia kultura fako. Kelkaj niaj lokaj grupoj jam atingis konkretajn formojn de kunlaborado fariĝante sekcioj de laborulaj ROH-kulturkluboj. La traktadoj ne estas ankoraŭ finitaj, ĉar aperis projekto de nova aranĝo en tutŝtata skalo. — Tial estas rekomendinde atendi pluajn instrukciojn. — Pri kontakto kun UNESCO estas komisiita vicprez. Kamarýt, kiu povis ankaŭ tiun ĉi jaron doni al ĝi utilajn informojn, kaj kiu kontaktis ankaŭ kun UEA-komisiito en tiuj aferoj E. D. Durrant. — Al hispana fakulo ni povis doni sciigojn pri funkcio de kelkaj hispanaj vortoj transirintaj en la ĉeĥan kaj sep aliajn lingvojn. — Laŭ peto de la Ĉs. Radio en Ostrava ni peris al Konkursa kolektivo de la gimnazio en Broumov korespondan kontakton kun junularo de la libera Ĉinio; la kolektivo donis al si taskon trovi tiun kontakton, sed ne sciis kiel. — La polan tagĵurnalon *Expres* Poznański ni informis pri programo de la Verda Stacio, kiun ĝi deziris enpresii, kaj ni petis la Ĉs. Radion regule informi tiun ĵurnalon pri la esp. artoprogramoj. — Kun Dro Kalocsay en Budapeŝto ni kontaktis pri artikolo de eminenta ĉeĥa profesoro lingvisto rilatanta Esperanton. — Al la redakcio de »*Esperantologio*« en Kopenhago ni liveris kompletigon por la listo »*Esperantologia literaturo*« el traktatoj kaj eldonaĵoj en ĈSR post 1945. — En Praha estis kurso por poŝtistoj. — Ekzistas 4 fervojistaj grupoj.

13. Informado de fremdlando pri niaj nacio kaj ŝtato. Tion ni rigardas krom disvastigado de la lingvo nia plej grava tasko. En Brno-kongreso ni akceptis rezolucion por pacbatalo sur bazo de la Stokholma rezolucio el marto 1949 kaj telegrafe informis pri tio samtempe kunsidantajn naciajn kongresojn invitante ilin al analoga decido. Niaj regionaj kaj lokaj kunvenoj akceptis porpacajn rezoluciojn kaj informis pri tio Ĉs. Komitato de la pacobatalantoj. Al la Dua Universala Kongreso de la Pacodefendantoj en Varsovio ni sendis saluttelegramon. — Ni tradukis el la itala en la ĉeĥan salutleteron de itala delegito por la varsovia packongreso k-do Graziadei al la ĉeĥoslovaka junularo kaj peris ĝian publikigon en la junulara ĵurnalo *Mladá Fronta*. — Aktuala Informa Bulteno de Praha »*Esperanto-Servo*« eldonata de nia Instituto de E. S., redaktata de Adolf Malík, kiu daŭre ankaŭ estras la Instituton, disvastigas laŭverajn sciigojn pri politikaj kaj ekonomiaj faktoj en nia lando kaj pri ĉeĥoslovakaj vidmanieroj. Depost ĝia komenco aperis pli ol 140 000 ekz., nia bulteno do estas unu el la plej disvastigitaj presaĵoj esperantlingvaj. Kaj unu el la plej batalemaj pledante por novaj ideoj ekonomiaj kaj politikaj. Ĝi ne estas neŭtrala, ĝi ja batalas por nova ordo socia. Ĝia redakcio ricevas multajn konfirmojn pri la legado kaj kritikojn aprobajn kaj malaprobajn. Ambaŭ estas legataj kun la sama intereso kaj bonvolo. Ni ja volas labori por nova sociordo kaj ni batalas ekskluzive per vero. — Komisiitejo por Informoj en

Bratislava eldonas por la sama celo ciklostilitan »*Kulturana revuono*«, ampleksan, dusemajne ĉ. 20 paĝoj. Ĝi dediĉas sian atenton preskaŭ ekskluzive al belartoj.

14. Lernejoj (direktoro de komisiono T. Kilian). — Esperanto estis oficiale instruata unusole en interesrondetoj, kiuj en lernejararo 1950—51 ekzistis en gimnazio en *N á c h o d* (prof. Jan Filip, 30 studentoj), gimnazio *O p a v a* (s-ano *Dumbrovský*, 10 stud.), Supera ekonomia lernejo en *O p a v a* (s-ano *Dumbrovský*, 27 stud.), meza lernejo en *S l e z s k á O s t r a v a* (s-ano D. Kočvara, 20 lernantoj) meza lernejo *P ř í b o r* (faka instruisto Ant. Sottek), meza lernejo *U r ĉ i c e*, industria lernejo *C h o m u t o v* (s-anoj Mucha kaj Pastor, 15 studentoj), *M o s t* (uzina lernista tendaro). La listo estas kompilita laŭ diversaj sciigoj, ne ĉiam sendas al ni gvidantoj de la interesrondetoj kompletajn informojn. Sume do estis laŭ tiu ĉi listo Esperanto instruata en 8 lernejoj al proksimume 147 lernantoj. Kie ne estis donita cifero, ni taksis ĝin 15.

Lektoratoj en Alta teknika Lernejo, fakultato de Specialaj Sciencoj, en Praha (lektoro Dr. Aug. Pitlík) kaj en Alta Komerca Lernejo en Bratislava (lektoro Pavol Rosa) daŭras.

15. Someraj kursaroj okazis kvar. En Doksy jam la kvinan fojon (157 p.), Karlovy Vary, tri sinsekvaj dusemajnoj (58 p.), Rožnov p. R. (60 p.), Svit (166 p.). Ili ĉiuj estas entreprenoj tre utilaj akcelante perfektigon de ĵamaj kaj akiron de novaj adeptoj de nia lingvo. Ni esperas, ke la situacio permesos daŭrigon de tiuj aranĝoj; ĝi estus tre dezirinda. La entreprenintoj de la ĝisnunaj kursaroj akceptu nian varman dankon pri ilia sindediĉo al tiu tasko. Kaj ni enskribu tie ĉi tre kontente la bultenon »*Verda Voĉo*« — Doksy — Svit« redaktatan de Ant. Slanina.

16. Ekzamena komisiono kunsidis kvarfoje, la 29. VII., 29. VII., 19. VIII., 5. XI. kaj donis 27 diplomojn pri scio kaj 18 pri kapableco instrui. — Al Ekzamena Komisiono Nederlanda ni donis detalan informon pri spertoj koncerne nian »*hejman taskon*«, sendis diversajn dokumentojn pri nia ekzamena procedo kaj ricevis de ĝi analogiajn informojn kaj dokumentojn. — Akceptitaj leteroj 105 forsenditaj 134.

17. Radio. La esperantlingvaj disaŭdigoj (mallongaj ondoj, meza ondo kaj Verda Stacio) daŭris laŭ programo ĝis la 17-a de septembro. Tiam Ĉs. Radio reorganizis dissendadon en fremdaj lingvoj malgrandigante ĝian amplekson. Inter nuligitaj dissendadoj estis ankaŭ ĉiuj en Esperanto. Venis jam centoj da leteroj al Radio en Praha petantaj restarigon de elsendado en Esperanto. La dissendado daŭris kvin jarojn kaj estis okazintaĵo unika en la mondo kaj laŭ amplekso (4000 elsendoj sume) kaj laŭ kvalito de temoj kaj laŭ prezentado. Akceptu dankon nia ministerio de informoj, kiu ebligis tiun ĉi grandskalan uzon de Esperanto, kaj la parolistoj, kantistoj, deklamistoj, aktoroj, muzikistoj, reĝisoroj profesiaj kaj amatoraj, kiuj tre ofere kunlaboradis. Akceptu dankon ĉiuj aŭskultintoj el 32 landoj, kiuj konfirmadis la aŭskulton. Kaj estu al ni pardonite, se ni esprimas nian miron pri fakto, ke ni diras tian dankon la unuaj kaj unusolaj.

18. Gazetara Servo (direktoro Jiří Kořínek). En la pasinta jaro dissendis la komisiono sume 12 foliojn kun 47 artikoloj. Multobligon de la artikoloj, kompletigon per propraj sciigoj kaj la dissendon ofere me prizorgis s-ano Fr. Pytloun el Hradec Králové. — La Eldandaĵa Servo kolektis dum la pasinta jaro 215 artikolojn. Ĉi tiun servon prizorgis dum la unua duono de la jaro s-ano Frant. Vyskočil en Brno kaj transprenis ĝin kaj plugvidis s-ano Libor Kovář en Brno. — Por bona funkciado de la ambaŭ servoj estas necesa daŭra kunlaboro de ĉiuj samideanoj. Se vi ekscias interesan, atentologan aferon el Esperantovivo, aŭ eĉ per Esperanto pri intereso Esperanton nekonzernanta, kiun vi ne ĉerpis el niaj komunaj gazetfontoj Heroldo, Esperantista k. s., konigu ĝin al mi laŭ adreso Jiří Kořínek, Brno 14, Drtinova 46. Aperintajn artikolojn

eltendu kaj sendu al la komisiito por la eltranĉaĵa servo Libor Kovář, Brno, Vranovská 28., ĉar la eltondaĵoj liverataj de la Eltranĉaĵa Kancelario ne estas fidinte kompletaj.

19. **Lingva komisiono** (dir. Dr. A. Pitlík) laboras laŭ la siatempe aprobita laborplano. Ĝi estas unuvaloke konsultejo pri lingvaj demandoj, koncernantaj precipe la uzon de la ĝustaj terminoj en Esperanto. Korespondataĵoj forsenditaj 35, ricevitaĵoj 42.

20. **Literaturo** (komisionestro Dro T. Pumprl.) La Komisiono akceptis en la jaro 1950 entute 24 leterojn, forsendis 20. Ili plejparte koncernis lingvan kaj stilan revizion de manuskriptoj. Estis kontrolitaj 140 paĝoj prozaj kaj 220 paĝoj versaj; inter ili troviĝas ankaŭ lingva kunlaboro ĉe la eldono de la verko de Majerová »Urbo sub signo de fajro« (en la traduko de Božena Vlčková). — Por preparata antologio el alilingvaj tradukoj de poemoj de Petr Bezruč estis al la redaktanto donitaj necesaj informoj pri la eĥo de Bezruč en Esperanto kaj estis disponigita taŭga Esperanta kontribuado.

21. **Librovendejo** (estro O. Ginz). Dum la pasinta jaro devis nia librovendejo barakti kun pli grandaj malfacilaĵoj ol iam antaŭe. Pro la necesa ŝparo de eksterlanda valuto povis niaj aŭtoritataj ebligi al ni liveron de eksterlandaj Esperanto-eldonaĵoj nur tute escepte kaj en kvanto nepre ne konforma al la bezonoj de ĉeĥoslovakaj esperantistoj. Speciale grava estis la absoluta manko de Esperanto-lernolibroj, urĝe bezonataj en ĉiuj lokoj de nia respubliko. Koncerne instruajn literaturajn verkojn la librovendejo kontentiĝis per disvastigo de ĉeĥa-esperantaj vortaroj Filip kaj Hromada, eldonitaj pasintjare. Ne plu estis disponebla vortaro esperanta-ĉeĥa, ĉar la 5000 ekz. de la nova postmilita granda eldono de Filip estis rapide post apero disvenditaj. La cetero venintajn nemultajn librojn devis la librovendejo zorge dividi preskaŭ senescepte sole inter la klubojn, volante tiel ebligi pli vastan utiligon. Kiam kolekto de valoraj Esperanto-libroj estis disponigita al la Asocio, la librovendejo estis feliĉa, ke ĝi povis disdoni ĝin inter la aktivaj grupoj — kompreneble sen pago.

Similaj malfacilaĵoj estis pri abono de eksterlandaj gazetoj, de kiuj sole nemultaj ekzempleroj povis esti prizorgitaj. Ĉeso de »Literatura Mondo« kaj la ĝis nun daŭranta haltigo de »Internacia Kulturo« signifis plej senteble baton por la ĉeĥoslovaka esperantistaro, ĉar tiuj du revuoj povis esti pli facile mendataj el nia lando. Ni esperas, ke ni povos aranĝi baldaŭ abonon al la bona gazeto de niaj ĉinaj amikoj »El Popola Ĉinio« laŭ maniero, kiu estos konforma al la validaj reguloj pri abono de eksterlandaj gazetoj. Ni ne povas rekomendi al niaj membroj, ke ili uzu alian vojon. — La librovendejo konscias, ke ĝi povis plenumi dum la jaro 1950 negrandan parton de la postuloj al ĝi prezentitaj kaj ĝi daŭrigas siajn klopodojn por plivastigo de siaj eblecoj, precipe per propraj eldonaĵoj.

22. **Junularo** (raportinto Eva Nývltová). Fondanta kunveno de la junularo en Praha okazis la 20-an de aprilo 1950 en Praha I, restoracio Piskáček dum ĉeesto de 14 p. Depost tiam okazas regulaj kunvenoj ĉiun jaŭdon. La 31-an de decembro havis junularo en Praha preskaŭ centon da membroj kaj propran klubejon konsistantan el 3 ĉambroj en Praha XII, Římská 35, kiu estas malfermita ĉiutage je la 16—21-a horo. En la klubejo estas disponeblaj negranda biblioteko kaj eksterlandaj gazetoj. Programo de la kunvenoj estas amuze kultura. Dum la jaro 1950 kantista rondeto ekzercis sin en pluraj esperanto-kantoj, kiujn ĝi prezentis kiel programerojn en E. Klubo. Tri el ili estis dissendataj de la Verda Stacio. En la Brno-kongreso reprezentantoj de la junularo el la tuta Respubliko interkonsentis pri provizora maniero de la junulara laborado. La junularo laboris en grupoj (rondetoj), kiuj elektis krom komitato sian »delegiton«. Tasko de tiuj delegitoj estis

regula raportado pri agado de la grupo al komitato de la junulara grupo en Praha. Tasko de tiu-ĉi komitato estas organizi la tutan movadon kaj zorgi, ke unuopaj grupoj sciu pri si reciproke kaj povu kontakti intense. La komitato plenumadis sian taskon eldonante laŭbezona cirkulerojn, kiu aperas dum jaro 1951 sub titolo »Vokas vin Praha«. Ĝis nun sukcesis la Praha-komitato kontakti kun sekvantaj junularaj grupoj: Bratislava, Jablonec n. N., Ostrava, Poprad, Lanškroun, Brno, Opava, Měděnec, Duchcov, Vejpřty.

*

LOKAJ INFORMOJ

Brno. — En februaro komenciĝis kurso elementa kun 11 p. gvidata de J. Vondroušek kaj kurso progresinta gvidata de J. Friedrich en Brno-Královo Pole. La ambaŭ kursoj funkcias en kunlaboro kun Komenský-Akademio Kleriga. Varbis por ili 250 afiŝoj dum 14 tagoj kaj gazetaĵoj. (J. V.)

Jablonec n. N. — La jarkunveno okazis la 18. II. 1951 en hotelo Stará Pošta, ĉeestis 12 membroj. Estis elektitaj prez. Miloslav Jíra, vicprez. Ant. Kopecký, sekretario Rony Janečka, kasisto Emil Mai, propagandistoj Eva Jírová kaj Beno Rössler. La kunveno ellaboris planon pro por la jaro kaj akceptis unuanime rezolucion pri ILPE, kiu tekstas:

Nia klubo ĉiam subtenis kaj daŭre subtenas la pacajn penadojn de nia Asocio kaj precipe ni subtenas kaj salutas la fondon de nova Internacia Ligo de Progresemaj Esperantistoj. Ni profunde konscias la minacojn de nova impériista milito kaj ni kredas, ke la sukcesoj de tiu ĉi nova Ligo estos grandiozaj kaj helpos garantii pacon el la tuta mondo. Ni estas ĉiam pretaj subteni la laboron de nia Asocia estraro. Subskribitaj: M. Jíra, prez., Rony Janečka, sekretario.

Karlovy Vary. Kluba krizo, kiu ekestis pro neatendata malluo de nia klubejo, ne tiom malfavore influis nian agadon, ol antaŭe ni timis. Komencula kurso, (15. X. 1950—5. II. 1951), kiun ni malfermis en la Stalinlernejo sub egido de la distrikta kultura komisiono, kiel kutime, sufiĉe bone sukcesis. Partoprenis 15 lernantoj, ĉefe junaj homoj, sed la plej juna kaj plej entuziasma estis la sepdokjara samideano Lud. Vachel, ĝisnun aktiva masonisto. Instruis Reček laŭ propraj metodo kaj lernolibro, helpis David, Mílek, Dr. Vaněk. Ni klubo fariĝis oficiale sekcio de fervojista entreprena klubo KV, kie ni estis tre amike akceptitaj. La klubo disponas tri bele ekipitajn ejojn, ĉiujn ni havas por nia libera uzo. Inter fervojistoj ni trovas verŝajne eĉ pluajn anojn kaj lernantojn. — Nuna adreso de la klubo: E. K., Karlovy Vary, palaco Lloyd.

Lanškroun. La 5-an de februaro estis elektita la nova komitato de nia loka grupo: Prezidanto: Boh. Vopršál; vicprezidanto Jar. Píček; sekretario Jan Werner; kasisto Josef Ryšavý; presoref. kaj bibliotekisto Josef Cink; ref. por kursoj kaj prop. Luboš Kretzchmar; anstataŭantoj: Olga Kolářová, Zdeněk Polák, Jar. Urban, Anna Neškudlová; revizoroj: Jan Černý, Václav Podvolecký, Josef Mareš. — La nova komitato kunvenas ĉiun lundon. La regulaj klubaj kunvenoj ĉiun unuan lundon en monato.

Lanžhot. — Kurson elementan laŭ lernolibro de Ing. Krajíc por 18 gelernantoj de la meza lernejo kaj 10 plenkreskuloj gvidas Fran Svačina. La kurso daŭros la 8. I. — 30. VI. 1951.

Rychnov n. Kn. — Post finiĝo de la elementa kurso komenciĝis la 13-an de feb. kurso por progresintoj, al kiu aliĝis ĉiuj, kiuj finis la kurson elementan. Nova elementa kurso komenciĝis la 16-an de februaro. Instruas s-ano Eva Suchardová.

Tanvald. — Jarkunveno okazis la 14. II. en hotelo Central dum ĉeesto de 7 membroj. La klubo partoprenis la 2-an kaj 3-an de julio en la pacsoleno en Jablonec n. N., ĝia esperantista flago estis portata en la unuaj vicoj. Nombro de membroj 16; ili korespondas kun fremdlando amase, dum la j. 1950 ili ricevis 459 korespondaĵojn. Estis preparita sekvanta plano por la unua duonjaro: 21. 3.: Vespere de poŝtmarkoj. — 18. 4.: Literatura vespero. — 18. 5.: Turisma vespero (specimenoj de prospektoj k. t. p.). — 13. 6.: Vespere de esperantista amikeco (specimenoj el korespondaĵoj, poŝtkartoj, donacetoj de fremdlandaj amikoj). — Estis elektita prez. Evžen Belda, vicprez. J. Blahout, sekretario J. Řezáč, kasisto Josef Novotný.

Praha. — La publika instanco Osvětová beseda (Kleriga Kunularo) aranĝis en la vintra sezono 1950/51 per kunlaboro de la Esperantista Klubo en Praha jenajn senpagajn kursojn: Ĉe-metodan kurson por 44 p. (gvidis Ant. Slanina), Elementan kurson laŭ Šupichová-lerolibro por 30 p. (gvidis J. Bendová), Superan kurson por 36 p. (J. Vítek), sume 110 lernantoj. La kursoj daŭris de 20. X. ĝis 7. I. 1951 en la estinta Jirásek-gimnazio en str. Ječná. Tuj poste oni komencis novajn kursojn por nealta kotizo: Por komentantoj (20 p., J. Bendová), por progresintoj (15 p., J. Bendová), por progresintoj laŭ la Ĉe-metodo (15 p., Ant. Slanina), konversacian (35 p., J. Vítek). (jm.)

Třebíč-Borovina. — Post enkonduka parolado fare de s-ano Th. Kilian komenciĝis en tiu ĉi grava industria entrepreno porlaborista Esperanto-kurso, kiun komune gvidos s-anoj Hamrová kaj Polanská kaj s-ano Svoboda. (ano.)

Třebíč. — Jam la trian fojon mi prelegis vespere dum 2 horoj en la loka Distrikta Politika Lernejo (OPŠ) pri la proletara internaciismo kaj Esperanto. La paroladoj vekis inter la aŭskultantaro - plejparte laboristoj - viglan intereson pri Esperanto. Plej grandan miron vekis la gazeto »El Popola Ĉinio« kaj leterojn de japanaj komunistoj-Esperantistoj, kiuj okultrafe konvinkis la aŭskultantojn, ke ankaŭ laboristoj, kaj ĝuste laboristoj, bezonas internacian helplingvon kaj ke la proletara internaciismo fariĝos viva fakto nur tiam, kiam ĉi u proleto povos interkompreniĝi kaj interkorespondi kun ĉi u proleto de l'mondo, li loĝu kie ajn, li parolu lingvon kiun ajn, lia haŭkoloro estu kia ajn. — Manko de lernolibroj bedaŭrinde ŝrumpigas la praktikan rezulton de mia laboro preskaŭ je nulo, tamen mi ŝtentigas niajn propagandistojn je tiu ĉi propagandobleco, kiu promesas doni bonan rikolton. (Th. Kilian.)

Třebíč. — La 19-an de februaro okazis ĝenerala kunveno de nia loka Esperanto-grupo. La prezidanto s-ano Th. Kilian montris en sia parolado, ke la ideo de l'paco estis la patro de Esperanto kaj ke ĉiu Esperantisto devas esti laŭ la vortoj de nia himno aktiva »paca batalanto«. Ni Esperantistoj en ĈSR estas feliĉaj, ke niaj porpacaj klopodoj kaj laboro plene konformas al la plej arda deziro de nia tuta popolo kaj sekve ankaŭ de nia registaro. La Esperanto-movado estas kaj nepre devas esti neŭtrala rilate la rason, religion, naciecon, sed ne povas resti neŭtrala rilate la problemon »paco aŭ milito«, kiu okupas kaj maltrankviligas la tutan homaron. Silentado rilate tiun ĉi demandon estus samsignifa kun jesado al milito. — La nova komitato: prezidanto: s-ano Th. Kilian, vizprezidantino: s-ano B. Zahřebelová, sekretario: s-ano J. Poláček, kasisto: s-ano K. Řehák. (ano.)

RICEVITAJ LIBROJ

Konstitucio de popola respubliko Bulgario. Publikigita en »Ŝtata Ĵurnalo« numero 284 la 6-an de decembro 1947. Eldonis Bulgara Esperantista Kooperativo. Sofia. 1950. 24 paĝoj, 15×20 cm. — Ĝi estas jam la kvara moderna konstitucio aperinta esperantlingve. (Aperis jam la Sovetia, Ĉeĥoslovaka, Japanaj). Ni tre ŝojas pro tiu ĉi apero, ĉar ĝi estas pruvo, kiom la popolo en popoldemokratiaj landoj interesiĝas pri leĝdona agado, kiom profunde ĝi kredas al potenco de la leĝo ankrita en amasa konscio. La traduko (fare de Minko Conkovski) estas bona, kaj tre facile komprenebla. La Bulgara konstitucio estas pli mallonga ol la Ĉeĥoslovaka aŭ la Sovetia. La plej granda diferenco inter ĝi kaj la nia estas institucio de la Prezidantaro de la Parlamento, kiu en Bulgario posedas analogajn funkciojn, kiajn ĉe ni la prezidento. Ni danku al la eldoninto pro ĝia iniciato kaj al la bulgara registaro pro ebligo de tiu ĉi grava eldonaĵo.

Inter Sudo kaj Nordo de Ferenc Szilágyi. Stockholm. Eldona Societo Esperanto-Förlagsförlingen Esperanto. 185 paĝoj, 15×19 cm. Bindita en »Integral«-kovrilo. Prezo sv. kr. 7,75. — Dr. Ferenc Szilágyi estas hungara vivanta jam preskaŭ dudek jarojn en Svedlando, kie li instruas Esperanton laŭ sia originala (lumbilda) metodo kaj verkas. En tiun ĉi libron li kolektis 8 siajn rakontojn diverstemajn, kiuj preskaŭ ĉiam iel rilatas al liaj travivaĵoj kaj en kiuj la aŭtoro ofte iel rolis. Ankaŭ preskaŭ ĉiuj iel rilatas problemon de lingva interkompreniĝo en fremda medio aŭ ideon de Esperanto. Ĉiuj rakontoj estas agrable legeblaj kaj legindaj. Ili rezultis el kontakto de esperantisto kun vivo en fremda lando. Ili estas efektiva frukto de praktika esperantismo. Ni dirus, ke tiu libro estos ofte citata en historio de esperantlingva originala literaturo. La titolon ĝi havas pro la lasta rakontaĵo. Ni lasu paroli la aŭtoron mem: »En la jaro 1947 venis al Skandinavio ĉ. 1200 hungaraj terkulturistoj, arbarlaboristoj, virinoj kaj infanoj. La laboristoj ricevis funkcion en la koncertaj laborkampoj laŭ la kontrakto, kiun la du ŝtatoj, la militinta hungara kaj la ne militinta sveda ŝtato faris... La kontrakto perdis sian validecon en 1949. Dum tiuj du jaroj, kiam la kontrakto validis, min dungis granda arbarposedanta entrepreno, kiel interpretiston kaj socian kuratoron por siaj hungaraj laboristoj, kiuj, proksime al la norvega limo, maldensigis la abiaron. El tiuj ĉi rapidaj du jaroj devenas la subaj senpretendaj memoroj. Por fari gravajn konkludojn la tempo ne sufiĉis.« — Sekvas kvar rakontaĵoj preskaŭ anekdotaj. Sed ĝi etas edifanta legaĵo. En la simplaj linioj flagras patriota sento, amo al fora patrujo, kiun la sperta viro ne ekspozicias, sed kiu bolas en la plej subaj tavoloj de lia animo. Estu salutita tiu ĉi vira virto!

Pri la lingvaĵo de la libro: Verkis ĝin homo, kiu estas vole nevole devigata uzi Esperanton ne unusole sur podio ĉe katedro sed ankaŭ en familiara vivo. Tie aŭ tie mi estus uzinta alian parolturnon, sed lingva sperteco de la aŭtoro devigas nin studi liajn esprimmanierojn. Ili ja estas rezulto de praktika uzado multjara en diverslingvaj medioj. En libro, kia estas tiu ĉi, naskiĝas vivanta lingvaĵo de Esperanto, eĉ se ĝi ne ĉiam ŝajnas korekta. Ĝi eble estos iam nomita ĵurnala Esperanto.

Kiso de la Reĝino. J. F. Najivin. Tradukis el la rusa lingvo kun permeso de la aŭtoro D. Staritsky. La »Epoko« libroj. Vol. X. 1950. The Esperanto Publishing Co Ltd., Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo. 188 paĝoj, 11×19 cm. Prezo 3 ŝ. 9 p. — J. F. Najivin estas rusa elmigrinto, verkinto de 80 volumoj. Tiu ĉi novelo rolas en belga Kongo, kie blankaj inĝenieroj en la tempo inter la du militoj konstruas fervojojn en teritorio de la negra gento Tumbo. Najibaras malamika gento Alele. Ĉefo de konstruaj laboroj estas inĝeniero ekstreme stulta kaj malkuraĝa, la leganto miras pri malsaĝeco de tiu mistera instanco, kiu sendis tian sentaŭgulon kiel ĉefon por laboro malfacila,

respondeca, riska, plena de danĝeroj. Sed inter inĝenieroj ekzistas Galin, rusa elmigrinto, kiu versimile estas geniulo, ŝafas la negrojn, ĉesigas malamikecon inter gentoj de Tumbo kaj Alele, sed spite lian geniecon ne venas al li eĉ penseto, ke belega, svelta Alele-reĝino vestita per imponanta (al la aŭtoro) leoparda felo, povus lin ekami. Krom tio la reĝino malbonodoras pro ranca palmoleo. Kaj la heroo inĝeniero amas edzinon de tiu stulta ĉefo. Ĝi estas reciproka laŭ sperto de romanlegantoj. Tre bedaŭrinde la leganto nenion ekscias pri tiu ĉi belega edzino krom tio, ke ŝi havas kapeton (se mi bone memoras, blondan), ke ŝi estas malgranda kaj maldika kaj ŝiaj okuloj estas blukoloraj. Galin estas sendata al grava esplora ekspedicio, kiu ne sukcesas, spite lian inteligentecon, la amanta reĝino spiras por lin revidi, la blanka belulino ankaŭ tre sopiras. En la fino la stulta, seka kaj longstatura ĉefo, fuĝante pro sia timo senkaŭze antaŭ la Alele-negroj, saltas en riveron kie lin formanĝas krokodilo. La edzino povos do regule edziĝi kun Galin. Kaj Galin solene kisas la Alele-reĝinon, solene, lerte kaj digne, la reĝino kondukas saĝege, transdonas la blankan eksedzinon en brakojn de la amanto; ekbruas granda festeno, la reĝino iras en sian kabanon kaj tie memmortigas sin.

La historio estas naiva. La priskriboj de la naturo tropika ne estas tro konvinkaj, ŝajnas, ke scioj de la aŭtoro devenas ne el propra sperto sed el libroj. Nenion vi ekscias pri la laboroj. Ŝajnas, ke en tiu Kongo dum fervojkonstruado ekzistas paradiza vivo, neniu bezonas labori, nek la negroj, kiuj aŭ festenas aŭ spionas aŭ ĵaluzas, nek la blankuloj, kiuj aŭ amindumas, aŭ parolas pri negravaĵoj. Tamen la aŭtoro sukcesis verki scenon kortuŝan tre funde, en la fino de la rakontaĵo, kiam estas priskribata ceremonio de la solena kiso. Li certe estis majstro. Sed por nuna tempo ni preferus tute aliajn temojn. Kial ne publikigi tradukon el iu de rusaj verkistoj efektive samtempaj vivantaj en Sovetia Unio?

La traduko estas sole meze bona. La tradukanto tro volas redoni laŭvorte la originalon sed rezultas el tiu klopodado multaj ne kutimaj parolturnoj kaj kreitaj vortoj. Li tro uzas ek- prefikson, tro malŝparas ankaŭ pri aliaj prefiksoj kaj sufiksoj. Pri la nomo de tiu blukula heroino: Lily estas tre ŝatata literatura nomo por tiaj virinetoj en multaj lingvoj, sed kial en esperanta teksto ne diri Linjo, ke karesemo estu videbla al ĉiu funde esperantlingva koro de la leganto? »La seka tono, de kiu« kial ne kies? »traglutis kininon« kial ne simple glutis? »kvazaŭ giganta forto ordonis« tie ĉi nepre devas esti »ordonus« aŭ pli bone »estus ordoninta«. »Sinjorino ne koleru!« estas sole ebla anstataŭ »ne koleriĝi«. Decido pri kiu ĉiuj konsentis, okazis ĉiesvoĉe ne »unuvoĉe«. »Gramofono rompita« estus dispencigita je du aŭ pluraj partoj, tiu de la reĝo Mobruki estis versimile difektita. »Reĝino atendis por Galin« kial ne atendis Galinon? Kial »ĝis revidiĝo« kiam tion ofte ni aŭdas je revido aŭ ĝis revido? »Si turniĝis ĉirkaŭ blanka estro, ŝi premiĝis al li« kaj simile. Certe pli bone estas. ŝi turnis sin, premis sin. Ni devus atenti la klasikan paradigmon. Ŝi ruĝiĝis pro honto, ŝi ruĝiĝis sin per ŝminko. En la unua kazo ŝi iĝis ruĝa ne volante, eĉ kontraŭ sia volo; en la dua kazo ŝi iĝis ruĝa intence. Tia distingo estas trovebla preskaŭ ĉiam, en situacioj, kiam la diferenco ne estas facile konstatebla, oni devas tamen klopodi sekvi tiun ekzemplon. »Partiestroj kulpigis sin unu la alian en ĉiaspecaj krimoj« kial ne »pri krimoj«? Iam la tradukanto kreas taŭgajn vortojn ekz. »li deĉevaliĝis«. Sed tre bedaŭrinde estas la fakto, ke korektado dum la preso estas farita ne sufiĉe zorge. Restis multaj preseraroj, ofte mankas supersignoj kaj aliaj eraroj ĝenas la leganton. Tio estas tre bedaŭrinda, ĉar la tipografia aranĝo de la libro estas tre bona, la papero kaj la preso eminentas, la novelo estas pli longa ol ŝajnas el nombro de la paĝonombro, ĉar la preslitteroj estas tre spacoŝparaj kaj sed tamen tre bone legeblaj kaj belaspektaj.

Ĉu socialisma libereco aŭ kapitalisma servuteco? Ĉu paco kaj abundo aŭ milito kaj mizero? Disvendata pere de Sennacieca Asocio Tutmonda, 67 Av. Gambetta, Paris 20. Aperas dank' al la mona kontribuo de Socialista Laborpartio de Usono. 32 paĝoj 13x17 cm. — **Deklaro de la Usona Socialista Laborista Partio.** Esperanta eldono. Distribuata de SAT 67 Av. Gambetta, Paris 20. 1950. 32 paĝoj 13x17 cm. — La programo de marksismo estas donita tie ĉi, ni diru eŭfemisme, neklare. Pri la grandaj rezultoj, kiujn akiris marksismo-leninismo en Sovetio, oni preskaŭ ne raportas. Tia pledado por socialismo ne estas neutila sed malutila.

Pligrandigo de paĝo-nombro de nia organo estis salutita de niaj membroj tre kontente. Ni dankas pro pluraj gratuloj ricevataj. Ni eldonados la numerojn alterne 8- kaj 16-paĝajn. Tiu ĉi numero do estas 8-paĝa, la 4-a enhavos 16 paĝojn k. t. p. Por ke ni povu aperi 12 foje dum la jaro, estas bezone, ke nombro de nia membraro ne malkresku. Klopodu ĉiu, ke neniu membro perdiĝu kaj akiru pluajn!

ESPERANTISTA VIVO

Mortis Běla Raichlová, eksinstruistino, vidvino de lernejestro en Náchod, la 26-an de februaro 1951.

Ŝia fraŭlina nomo estis Krapková, ŝia kuzo J. Krapka estis inter unuaj disvastigantoj de socialismaj ideoj en nia lando. Ankaŭ ŝi staris inter la unuaj en la fronto de socialistaj batalantoj. Kiel studentino en Pedagogia Instituto ŝi gvidis malsatantajn laboristojn en Kladno al distrikta prefekto en Smíchov; estis pro tio eldonita arestordono je ŝi kaj ŝi devis kaŝi sin en Slovakujo. Kiel instruistino ŝi laboris en Lom en Orlické-montaro, kaj varbadis tie laboristojn, teksistojn kaj etajn terkulturistojn por socialismaj ideoj. En 1891 ŝi aŭdis de polaj studentoj kanti »Ruĝan Flagon«. Ŝia melodio kaptadis korojn kaj rapide disvastiĝadis. Oni petis ŝin, tiam 20-jaran fraŭlindin, traduki la poemon en la ĉeĥan. Ŝi plenumis la peton ne supozante, kiom ofte kaj kiom entuziasme estos ŝia teksto kantata. Esperantistino ŝi fariĝis en j. 1889—90 en socialista kultura rondeto gvidata de studentoj ĉe laboristaj kunvenoj en Praha, U Pštrosů. Tie komencis instrui Esperanton juna Fr. Vl. Lorenz, tiam kunlaboranto en socialistaj gazetoj. Krapková-Raichlová restis fidela kaj al socialismo kaj al esperantismo dum tuta longa vivo plenigita per laboro celanta plibonigi staton de la homaro. Historio de ŝia riĉa vivo atendas tiun, kiu verkos biografion de tiu eksterordinara virino.

Edziĝo. Samideanino Míla Loždínová, oficistino el Brno-Tuřany kaj s-ro Jaromír Řičář, sekretario de Regiona Sindikata Konsilantaro en Brno, la 24. II. 1951. Sinceran gratulon!

*

KORESPONDI DEZIRAS

Adolf Brázda, tajloro, **Nové Město na Mor.**, Ĉeĥoslovakio, kun tuta mondo.

Kenneth Le Grant, c/o F. Pool, 35 Cunningham 3 L, **Sydney**, N. S. W., Aŭstralio kun ĉs. samideanoj.

J. van Mulligen, Bloemstraat 39, **Steenwijk**, Nederlando.

Betty Hubanová ĉe Laufer, Ludanská 7, **Levice**, Ĉeĥoslovakio.

Kaichiro Fujihara, Hachihama, **Okayama**, Japanio, 18-jara japana studento kun student(in)oj, laboristoj kaj instruist(in)oj.

Naše rubrika Ellerni je druh kursu pro pokračilé. Její studium doporučujeme zvláště kandidátům vyšší zkoušky. První serii (strany 1—12) vydali jsme jako zvláštní otisky a nabízíme je zvláště novým čtenářům za 10 Kčs vyplaceně v našem knihkupectví v Praze II, Malá Štěpánská 7.

Adiaŭaj vortoj de Ifigenio.

Ne tiel mia reĝ'! Sen via beno kaj kontraŭ via volo mi ne iros. Nin ne forpelu! Ĉarma kora rajto de reciproka gastameco ligu nin ambaŭ: kaj tiele ne por ĉiam ni estos disigitaj. Tiel same profunde, kiel mian propran patron mi amas vin per mia tuta koro, kaj tiu sento restos por eterne. Se iam eĉ la plej malgrava homo el via gento al orelo mia alportos sonon de la lingvo, kiun el via buŝo aŭdi mi kutimis, kaj sur la plej malriĉa mi rimarkos la karan formon de la vesto via: Mi tiam lin akceptos kiel dion, mi mem al li pretigos la kuŝejon, sidigos lin sur seĝo ĉe la fajro, demandos nur pri vi kaj via sorto. La dioj al vi donu rekompencan por viaj faroj, via bonkoreco! Ho, tiam pli kviete al la veloj la vento blovos, kaj pli trankvilige el la okuloj de la foriranto silentaj larmoj fluos. Ho, adiaŭ! Por signo de antaŭa amikeco la dekstran manon vi al mi etendu.

Ze Zamenhofova překladu Goethovy Ifigenie v Tauridě. Překlad vyšel r. 1908 a byl proveden téhož roku profesionálními herci na kongresu v Drážďanech.

*

Mencio: Fiŝo kaj ursa plandaĵo.

Oni ŝatas fiŝon kiel ankaŭ ursan plandaĵon,¹⁾ sed en la okazo, ke oni devas elekti inter la du, oni preferos ursan plandaĵon ol fiŝon. Oni ŝatas vivon kiel ankaŭ justecon, sed en la okazo, ke oni devas elekti inter la du, oni preferas justecon ol vivon.²⁾

Efektive oni deziregas vivon, sed ekzistas io pli forte dezirata ol vivo; oni do ne ĉiam volas alteniĝi³⁾ al ĝi. Efektive oni maldeziras morton, sed ekzistas io pli forte maldezirata ol morto; oni do ne ĉiam volas eviti ĝin.

Se estus nenio pli dezirata ol vivo, kial oni ne uzas ĉian ajn rimedon por ĝin konservi? Se estus nenio pli maldezirata ol morto, kial oni ne provas ĉian ajn rimedon por ĝin eviti? La solan rimedon por vivi oni tamen ofte ne uzas; la solan rimedon por eviti danĝeron oni ofte ne provas. Do mi diras: ekzistas io pli dezirata ol vivo, ekzistas io pli maldezirata ol morto.

Ne nur saĝulo posedas tiun konscion, sed ankaŭ ĉiuj homoj ĝin havas, — sole la saĝuloj povas ĝin neniam perdi.

Estante en la situacio, en kiu sufiĉas korbeto da pano aŭ pelveto da buljono por subteni la vivon kaj eviti la morton, stratbubo ne akceptos ĝin, se oni donos al li kun insulto; eĉ almozetanto ne volos ĝin ricevi, se oni ĵetdonas al li kun mokego.

Monon kaj riĉaĵon tamen oni ofte ricevas sen ia deca aŭ justa kaŭzo. Kion la mono kaj riĉaĵoj ebligas al la homoj fari? Ĉu lukse ornami sian loĝejon? Ĉu havigi al si belulinojn? Ĉu helpi al siaj konatoj mizeraj?

En la okazo, en kiu minacis morto pro malsato, oni ne

ricevis maljustaĵojn: tamen oni kuraĝas tie ĉi ilin ricevi nur pro tio, ke oni povas lukse ornami siajn loĝejoj, havigi al si belulinojn, helpi al siaj mizeraj konatoj.

Ĉu oni faras tion, ĉar alie oni ne povas? — Ne! Ni nomas tian homon perdinta la konsciencon.

En la ĥina tradukis K. Ossaka.

Poznámky: 1) medvědí tlapa je pochoutka v Číně oblíbená; je tu řečeno plandaĵo, protože se jedná o maso k jídlu, stejně jako se říká bovaĵo, porkaĵo. 2) dáváme přednost spravedlnosti před životem; preferi je přechodné sloveso, PV má příklady: Preferi supon ol viandon, poezion ol prozon; lze to přeložit též: Míti raději polévku než maso, poezii než prózu. 3) al-ten-iĝi = přilnouti.

Je to ukázka z knihy Perloj el Oriento. 1921. Eldonejo Esperanta. Nippon Esperanto-Sya. Tokyo 1921. — Menciono je latinské jméno českého filosofa Meng-Ču (372-288 př. Kr.).

*

La surskribo.

De ses monatoj lin turmentis mizerego. Siajn lastajn librojn vendinte, li vagadis dum mateno de decembro rigardante la profilon de l'palaco Louvre malaperantan en nebulo, — tamen ne forgesante la mizeran staton de ŝuoj — kiam li subite ekvidis, apud l'ŝtono, ion briletantan.

Tio estis monero de unu franko.

Tial ke li estis ne manĝinta de du tagoj kaj fuminta de nekalkulebla tempo — kaj ke ekster tio la neĝo falis dense, li tuj intencis, kio ne estas mirinda, eniri en lakto-vendejon, kiun de longe li estis rimarkinta, sed kien neniam li estis enirinta (vi divenas kial), por trinki tason da ĉokolado, kaj ĝuadi bonan pipon, legante ian gazeton.

Li aĉetis do gazeton, pipon de Sankta-Omero kaj por 25 centimoj da tabako. Malgraŭ la kriegoj de liaj intencoj, la penso fumadi »bonan pipon« en varmigita loko lin allogis precipe; tial li turnis sin rapide al la gasta domo, kies gemastroj — stranga afero — riĉiĝas per la malmultaj kopekoj de malsatuloj.

Li do enpaŝis. Li ordonis tason da ĉokolado, glutis du bulkojn, li sola, kaj, kiam li sentis sin iom pli bone, li malfermis la gazeton.

Malrapide, malrapide, li plenigis sian pipon... sed kiam li sin preparis por ĝin ekbruligi, por ke li forpelu iom de sia malĝojo, levinte le okulojn, li ekvidis; balanciĝantan de la plafono larĝan surskribon, kiu absolute proklamas, per blankaj literoj sur blua fundo: Estas tute malpermesite fumi tie ĉi.

El George Aurial trad. F. Lallemand.

Toto povídka je vybrána z týchž Esperantaj prozaĵoj jako »Bone kaj malbone« s první strany. Učilo se z nich mnoho esperantistů. Všimněme si dnes, jaký je rozdíl v sociálním ustrojení společnosti před první válkou a jaké je dnes u nás. Dnes by si nikdo takovou povídku u nás nevymyslíl.

*

ĈINA J PROVERBO J

1. Lamplumo estas ja bela sed sunlumo estas pli hela.
2. Suferigas vin kia ajn malĝojo, tamen ne ploru apud la vojo.
3. Plian fojon trompita plia saĝo aldonita.

Tradukis Ly Moje.

»El popola Ĉinio«, novem. 1950